de betsukero. La libron ilustras tre
klaraj teknikaj desegnoj.

Intervjuo kun Aleksandra Mussabini,

En junio 2005 la Esperanto-grupo de Mulhouse festis la 60-Esperanto-jariĝon de sia klubanino, nome de s-ino Aleksandra Mussabini. Efektive ŝi eklernis Esperanton antaŭ 60 jaroj en Egiptio. Pro tiu nekutima situacio ekestis multaj demandoj, al kiuj Aleksandra volonte respondis okaze de intervjuo por la loka bulteno SRK (Sud-Rejna Kuriero) de la grupoj de Mulhouse kaj de Bazelo. Jen ŝia tre interesa intervjuo. André Grossmann

Nia amika festo, fine de junio 2005, en la hejmo de Maurice kaj Marlyse Schlewitz. Sam-okaze ni festis la 60-Esperanto-jariĝon de Aleksandra Mussabini. Ŝi montris al ni interesajn fotojn pri tiu epoko.

Ekestis multaj demandoj pri ŝia Esperantistiĝo, pri la Esperanto-vivo kaj pri ŝiaj travivaĵoj en fora Egiptio.

SRK proponis al ŝi intervjuon, kiun ŝi volonte akceptis.



SRK: Saluton Aleksandra, okaze de nia amika kunfestaĵo ĉe Maurice en lasta junio, ni eksciis, ke antaŭ 60 jaroj vi eklernis Esperanton en Egiptio en la urbo Aleksandrio, kie vi jam spertis viglan Esperanto-vivon. Vi ankaŭ montris al ni tre interesajn fotojn pri tiu periodo. Tio ŝajnas iom nekutima travivaĵo, tial ni volonte ŝatus scii pli multe pri via vivo kaj pri Esperanto en Egiptio.

Aleksandra: Saluton! Pro tio, ke pluraj gesamideanoj interesiĝas pri mia esperantistiĝo kaj naskiĝo en fora lando, mi volonte rakontos al vi iom resume. Antaŭ ĉio, mi tre sincere dankas ĉiujn ĉeestantojn por la agrabla vespero, surprizo kaj honoro okaze de mia 60-Esperanto-jariĝo.

Do, 3 el miaj geavoj estis ĉeĥaj kaj naskiĝis en Bohemio. Unu estis el Malto kaj naskiĝis en Aleksandrio. Tiam Malto estis brita.

Mia avino iris Aleksandron kaj okupiĝis pri la familio de mia avo. Ili tiel konatiĝis. Sed ŝi tiam parolis nur ĉeĥe kaj germane. Finfine ili geedziĝis kaj vojaĝis al Mozambiko, kie mia avo trovis interesan laboron. Tie naskiĝis miaj patrino kaj onklino. Sed pro risko de malario ili revenis al Aleksandrio.



Mi troviĝas en la dua vico maldekstre kun miaj samklasaninoj.

SRK: Kiam okazis tio?

Aleksandra: Ĉirkaŭ 1900, fine de la 19a jarcento, komence de lasta jarcento.

SRK: Kaj viaj gepatroj?

Aleksandra: Rilate miajn gepatrojn, mi scias, ke mia avino kaj mia patrino (tiam 26jara) vojaĝis al Prago por renkonti mian patron (ŝajne jam konata de ili). Ili geedziĝis tie kaj post kelkaj monatoj venis Aleksandron, kie mi naskiĝis.

SRK: Kian naciecon havis viaj gepatroj?



Ermina pruntedonis la nigran vestaĵon. Mi tre ŝatis kaj ofte vizitis ŝin, kie ŝi kaj familio havis povran loĝejon sur la tegmentoteraso. La edzo estis nia pordisto.



Mi en nigra egipta vestaĵo

Aleksandra: Mia patrino estis brita kaj mia patro ĉeĥa.

SRK: Kian lingvon vi parolis tiam?

Aleksandra: Germane kun mia ĉeĥa avino kaj itale kun mia malta avo. Jes, mi vizitadis germanan ler-

nejon, kie mi lernis ankaŭ la francan kaj la anglan. Ĝi estis bonega lernejo kun germanaj fratulinoj. La lernejo ankoraŭ nun ekzistas, sed la fratulinoj estas nun koptaj. Sed mi parolis ankaŭ itale kun la homoj kvankam mi ne lernis ĝin. Mi estis 7-jara knabino, kiam mia patro reiris al Prago por elteni stomak-operacion. Li estis longe malsana, sed ni daŭre korespondis germanlingve.

SRK: Ĉu en Aleksandrio estis multaj eksterlandanoj?

Aleksandra: Jes multaj, estis italoj, maltanoj, grekoj, britoj, francoj, germanoj, poloj, jugoslavo, armenoj ktp.

SRK: Kiaj estis viaj kontaktoj kun la loĝantoj?

Aleksandra: Libananoj, sirianoj parolis france. Jes multe da geamikoj de mia patrino parolis france. Ankaŭ kelkfoje necesis paroli arabe. Sur la strato oni ofte aŭdis la italan.

SRK: Kial estis tie tiom da eksterlandanoj? Ĉu pro la laboro?

Aleksandra: Jes efektive. La egiptanoj estis malriĉaj kaj ne tiom edukitaj. Por la eksterlandanoj estis multaj lernejoj. Sed dum la milito ni ne rajtis paroli pri politiko en nia lernejo.

SRK: Kaj en kiaj cirkonstancoj vi eklernis Esperanton.

Aleksandra: Mia patrino instruis tajpadon kaj la francan lingvon. Ŝi instruis ĝin al iu anglo s-ro Holt, kiu estis esperantisto. Pere de li, ni konatiĝis kun Esperanto, lernis la lingvon kaj havis kontakton kun aliaj gesamideanoj en Aleksandrio. Fakte s-ro Holt post la kurso de franca lingvo instruis Esperanton al la instruistino kaj pli poste al mi kaj al mia fratino. Rapide ni konatiĝis kun pola "onklo" estimata de ĉiuj. Tri monatojn poste ni jam parolis la lingvon kaj eĉ instruis ĝin per la tre bona libro "Ellernu" de Ferenc Szilágyi.

SRK: Ĉu vi iel aktivis en la movado?



Jen fotoj pri la tiamaj Esperanto-grupoj en Egiptio en 1945



Aleksandra troviĝas en la mezo kun koliero. Apude estas ŝia fratino. La ridanta sinjorino en la unua vico estas ŝia patrino. La pola "onklo" estas sub la stelo. S-ro Holt sidas maldekstre en la unua vico.

Aleksandra: Jes, mia patrino iĝis FD por instruado, mia fratino por turismo kaj mi por korespondado. Mi ricevis ĉiu-tage leterojn el diversaj landoj, kun petoj pri korespondantoj en Egiptio. Ne trovante iun, mi mem respondis kaj subite mi havis 28 leter-amikojn en preskaŭ ĉiuj kontinentoj, speciale en Eŭropo. Kelkaj ĉesis korespondi, aliaj forpasis. Kun s-ro Holt kaj dana leter-amiko, kiujn mi persone konis, mi longe korespondis. Ambaŭ forpasis post preskaŭ 50 jaroj da fidela korespondado. S-ro Holt eĉ vizitis min en Illzach kaj kune partoprenis la tiaman nacian kongreson en Gérardmer.

SRK: Kia estis la etoso en Aleksandrio?



Supre de maldekstre: la pola onklo, la ĉefdelegito en Egiptio Tados Megali. Sube: mia fratino, mia patrino kaj mi.

Aleksandra: La etoso estis vere simpatia. Ni havis belan ĉambron por kunveni kaj por instrui. Ankaŭ en la kadro de kristanaj asocioj YMCA por la viroj kaj YWCA por la virinoj.

SRK: Tamen poste vi forlasis Egiption, pro kio?

Aleksandra: Post la fino de la milito, en 1945, britaj kaj aliaj armeanoj forlasis Aleksandriion. Mi naskiĝis kaj edziniĝis en Aleksandrio, sed kiam mia edzo estis maldungita pro tio, ke nur 10% da eŭropanoj rajtis labori tiutempe, ĉar lokaj loĝantoj estis prioritataj, ni planis forveturi.

Antaŭ la sfinkso
Junio 1947



SRK: Kien vi tiam veturis?

Aleksandra: Laŭ mia bofrato tiam loĝanta en Kimrio, mia edzo trovos laboron tie, li estis akceptita nur kiel mekanikisto en karbo-minejo, kie laboris kelkaj alilandanoj. Post pluraj monatoj mia edzo skribis al sia frato en Aleksandrio petante, ke li faru sian eblon, vidu influ-havajn personojn ktp.. ĉar li deziris reiri Aleksandron. Tie en Bridgend naskiĝis mia unua filino.

SRK: Do tio ne estis via definitiva reveno al Eŭropo. Ĉu li sukcesis en tiaj klopodoj?

Aleksandra: Pro tio, ke ni jam definitive forlasis Egiption, nia situacio estis malfacila; ni atendadis kaj fine subaĉetante iujn personojn, ni sukcesis revenvojaĝi. Post longaj monatoj, mia edzo sukcesis ree labori, kie antaŭ 2 jaroj, li estis maldungita. Ĉar oni ja ne trovis taŭgan anstataŭanton.

Intertempe li faris dungpeton ĉe la mara kompanio de Suez-kanalo. Kiam alvenis la pozitiva respondo, ni ree transloĝiĝis... al Port-Fouad, urbeto aliflanke de Port-Saïd trans la kanalo. Oni simple transiris la Suez-kanalon dum kelkaj minutoj per pram-ŝipo.

SRK: Kia estis la vivo tie?



Aleksandra: La laboro kaj la vivo estis agrablaj, tie ankaŭ naskiĝis mia dua filino. Sed en julio 1956 Nasser, la tiam prezidento de Egiptio naciigis la Suez-kanalon. Ni ankoraŭ troviĝis en Port-Fouad kiam en la nokto de la 5/6aj de novembro, francaj paraŝutistoj okupis la urbon, kiu kapitulacis. Dum la tago ni vidis la francajn paraŝutistojn malsupreniri; same okazis en Port-Saïd, sed tiuj estis anglaj. En decembro ni forlasis Egiption por ĉiam.

SRK: Ĉu tiam vi venis al Francio?

Aleksandra: Jes, je Kristnasko ni atingis Toulon kaj per speciala aŭtobuso ĉiuj enmigrintoj estis veturigitaj ĝis Cavalaire-sur-Mer, kie ni pasigis proksimume unu monaton en malplena hotelo. Feliĉe ne estis turisma sezono.

SRK: Kaj kial vi finfine venis al Alzaco?

Aleksandra: Intertempe mi skribis al geamikoj de mia edzo.. germanlingve, kaj dum ili troviĝis en Usono kaj jam sciante pri la eventoj en Egiptio, ili informis nin, ke ilia domo en Lautenbach-Zell (proksime de Guebwiller) estis je nia dispono.

SRK: Do vi ne tuj atingis Illzach, kie vi nun loĝas?

Aleksandra: Post proksimume unu jaro ni transloĝiĝis al Mulhouse, kie mia edzo trovis laboron; poste ni ree transloĝiĝis al Illzach, ĉar tie estis apartamento je nia dispono, kiun post kelka tempo, ni aĉetis.

SRK: Ĉu vi tiam perdis kontaktojn kun Esperanto?

Aleksandra: En 1977 mi legis anoncon pri Esperanto en la loka ĵurnalo, kaj eĉ aperis artikolo en la gazeto fare de s-ro Lienhardt. Lin mi kontaktis kaj poste konatiĝis kun André Grossmann. Antaŭ tiu hazardo, mi tute ne sciis, ke ekzistas Esperanto-movado ĉi-tie.

SRK: Ĉu vi estas kontenta pri via vivo en Francio kaj pli precize en Alzaco.

Aleksandra: Je Krisnasko 2006 ni festos la 50-jariĝon de nia alveno en Francio. Mi aldonas, ke mi estas feliĉa troviĝi en Alzaco; verŝajne tio memorigas mian infanecon, kiam mi parolis kaj kantis germanlingve en lernejo kaj hejme. Mi neniam preterlasas la okazon aŭskulti la belajn kanzonojn ĉe la germanaj televidaj kanaloj. Tamen kun la najbarinoj, krom la francan, mi pli ofte parolas itale ol germane.

SRK: Se mi bone komprenas vi daŭre flegas la 5 lingvojn, kiujn vi konas, germana, angla, franca, itala kaj Esperanto.

Aleksandra: Jes, mi ŝatas la lingvojn. Mi ofte konsultas vortarojn por koni novajn vortojn en la 5 lingvoj. Krome mi profitas la okazon povi uzi ilin.

SRK: Ni kore dankas al vi.

Por SRK intervjuis Maurice Schlewitz kaj André Grossmann

Edmond Ludwig transdonas al Aleksandra Mussabini, nome de Mulhouse-Esperanto, la donacon kaj bondezir-karton, kiun ĉiuj anoj subskribis. Gratulon al Aleksandra.

Kial Alfons Mucha estas tiom famekonata en la mondo?

Registro de rememoroj de GERALDINA MUCHOVÁ fame konatigitaj dum la vespero "DIAOLOGOJ pri Prago" 12.6.2002. Ŝi rakontas pri Alfons Mucha.

Ni ankaŭ memoras, ke Roberto Kueny en 2003 skribis pri tiu pentristo kaj grafikisto en La Informilo 122.



Antaŭ nelonge iu donacis al mi libron pri SÁRA BERNHARD, kiun verkis unu el ŝiaj nevoj. Interesa libro, kie estas priskribita sufiĉe fundamente tuta tempospaco, kiam Alfons Mucha kreis per ĝi tiujn famekonatajn afiŝojn.

Mi volis trovi en la indekso la nomon de Alfons Mucha sed mi ĝin tie tute ne trovis, eĉ unu mencio pri li tie mi ne trovis! La libro estis verkita en la 1940aj jaroj, kio estas baldaŭ post lia morto kaj li tie entute ne aperas!

Tion mi al vi diras, ke vi ekkonsciiĝu, kiom baldaŭ post lia morto estis Alfons Mucha en la eksterlando forgesita. Mi scias, ĉi-tie en Ĉeĥio, li estis neniam forgesita, sed en eksterlando post lia morto preskaŭ neniu pri li sciis kaj malgraŭ ĉio li estas nun en la tuta mondo unu el la plej konataj ĉeĥaj pentristoj. Kiel estas tio ebla?

Dum la milito lia filo Jiří en iaj frontoj renkontiĝis kun certa junulo nome BRIAN READE, kiu en civila vivo estis kuratoro en VICTORIA AND ALBERT MUSEUM en Londono. Jirka subite ricevis de li sciigon, ke li intencis rekte en la muzeo aranĝi ekspozicion de afiŝoj de Alfons Mucha kaj ĉu Jirka povas al li konsili, kie eblas akiri ekzemplerojn.

Vi povas imagi, kioman ĝojon Jirka havis kaj senprokraste proponis al BRIAN READE ĉiujn miajn afiŝojn. Tio estis en 1960. Dum la komunismo, t.e. neniu privatulo povis ion aranĝi mem. Problemo 1) estis konvinki BRITEN-on, ke li devas oficiale peti pri pruntedono de niaj afiŝoj, kion li ekkompreni ne povis. Sed kiam li finfine la peton sendis, la permeson li ne ricevis. Ĉi-lokaj institucioj al si diris, ke ĉio estas nur strebo sendi la afiŝojn al Londono, de kie ili neniam revenus. La kontrakto signifis nenion kaj kial ĝuste Mucha!? On.? Jirka estis pacienca, daŭris tio longtempe, sed la pacienco kaj talento venkis kaj granda sendaĵo de la afiŝoj forveturis al Londono.

La ekspozicio havis sensacian sukceson. Unu el la sukcesoj ja estis, ke la firmaoj, kiuj kreas kopiaĵojn – t.e. bildkartojn ktp. eksciis, ke la posedantoj de la kopirajto (tio

estas ni) estas sigelfermitaj malantaŭ la fera kurteno. Kaj la firmaoj komencis kreadi kion ajn el Mucha-motivoj kaj subite Londono estis plenplena de Mucha-aĵoj. Ni ricevis eĉ nenion, sed Jirka diris, ke tio ne gravas, ke temas nur pri granda senpaga propagando. Tio donis al li ideon. Li ne forgesigos tiun-ĉi momenton, male, li strebos, ke la ekspozicioj de Mucha daŭrigu. Aliaj Galerioj eksciis pri tiu granda sukceso kaj ili mem ekinteresiĝis.

La reakcio de nia ministerio de kulturo kaj de nia nacia galerio estis nenia, sed la fakto Jirka-on ne rezignigis! Tuj li mem kontaktis tiujn galeriojn, kiuj jam interesiĝis kaj ekagis pri pluaj ekspozicioj.

Li mem povis nenion pagi, prizorgi financojn. Temis do pri malgrandaj ekspozicioj. Li mem devis persone kontakti la aranĝantojn, sed en tiu reĝimo temis pri malfacila afero. Peti pri privata vojaĝo, petoj pri valutoj, invito de parencoj en eksterlando, permeso de la labordonanto kaj longe atendi, ĉu la vojaĝo povos realiĝi. Granda burokratio.

Jirka ne bezonis la valutojn, ĉar li estis verkisto, do tio validis kiel okupo kaj kun invito havis nenian malhelpaĵon. Mi ĉiam garantiis ĉiujn liajn elspezojn.

Mallonge: la ekspozicioj de Mucha komencis okazi! La ŝtataj instancoj al Jirka tion ne malpermesis! Kial? Ĉar ili bezonis la valutojn. Sed, ke la valutoj entute estu, Jirka devis la diversajn firmaojn konvinki, ke la motivoj de Mucha, kiujn ili uzadis estas ankoraŭ en kopirajto. Ili ĉiam elpensadis kialojn, pro kio ili tion pagi ne povos. Sed la solvado de tiu-ĉi problemo venis tute hazarde. En 1954 Jirka multe komencis tradukadi, romanojn, teatraĵojn de iaj eminentaj anglaj kaj amerikaj aŭtoroj el la 20-a jarcento. Li konis persone la aŭtorojn, ili eĉ alveturis al ni por vidi la enscenaĵojn. Unu el tiuj aŭtoroj venis kun sia edzino, kiu laboris en venda galerio en Londono. Ŝi pri tio parolis kun Jirka kaj la tutan tempon zorgis pri la kopirajto de Jirka. Komence la firmaoj ne volis pagi, sed foje unu el ili elpagis kaj ĝi mem zorgis pri ilia pagado. En Novjorko unu posedanto de librovendejo



CYCLES PERFECTA



havis tie galerion kaj tie Jiří aranĝadis la ekspozicion de Mucha. Oni bone sciis, kiom da malfacilaĵoj Jirka havis koncerne la ekspoziciojn kaj ĉiuj admiris lin. Tie ĉi la homoj sciis, ke Jirka estas filo de A. Mucha, sed ili konis lin nur kiel verkiston kaj neniu povis supozi, kiom da strebo al la ekspozicio li dediĉis! Ili ĉiam miris, kial li tiom ofte veturas eksterlanden. Malgraŭ ĉio de tempo al tempo aŭdiĝis pri la ekspozicio en la eksterlando. Poste, kiam oni eksciis, ke la ekspozicioj aranĝas Jirka mem, komencis vastiĝadi malbelaj kalumnioj: ke li estas sendita fari ian spionaĵon kaj ke la ekspozicioj devas kaŝi tion, kion li fakte faras! Kaj ke mi, kiu tion scias, estas nur naivulino, kiu ne scias, pri kio temas! Jirka la kalumniojn ignoris. Sed min tio ege ĝenis. La kalumnioj komencis vastiĝadi inter la elmigrintoj en diversaj landoj. Jirka devis zorgi pri provizo de valutoj. Ofte li havis problemojn pri elserĉado de nova firmao aŭ novaj unuopuloj, kiuj volus uzadi la motivojn de Mucha por siaj produktaĵoj. En la 70-aj jaroj li havis problemojn eĉ pri la elvojaĝa dokumento. Finfine mi decidis rekonstrui la patrinan dometon en Skotlando, ke Jirka

povu tie en komuna mastrumado viziti sian edzinon, je invito. Li tre malofte vojaĝis Skotlandon, sed almenaŭ ni povis renkontiĝi en diversaj landoj de la mondo. – Jirka longtempe serĉis japanan investanton. Foje kaj finfine li sukcesis kontakti s-ron DOI. Tre riĉa japano, posedanto de tute malgranda firmao. Li fariĝis investanto de la unua ekspozicio en Tokio. Tiu-ĉi ekspozicio vekis grandan intereson pri la verkoj de Mucha kaj sekvis tuta vico de pluaj ekspozicioj en diversaj japanaj urboj. Iu diris, ke tio estis ĉeĥoslovaka ambasadoro en Tokio, kiu atentigis ĉi-lokajn instituciojn pri la granda intereso pri Mucha en eksterlando. Ne gravas, kiu tio estis, pure kaj nome la Nacia Galerio komencis kunlabori kun Jirka. – Sekvis granda ekspozicio en Parizo, kiu daŭrigis en Darmstadt. Ĉiu ĉe ni certe rememorigas pri grandaj frontoj de homoj, kiam tiu-ĉi ekspozicio finfine alvenis en la Jízdárna de Praga kastelo. Mi rememoras dum parolo kun mia bopatrino, kion ŝi diris: Jirka kiel eta knabo ne permesis, ke iu lin helpu... li ĉiam diris: "Jiří mem"! kaj vere: li realigis, Jiří mem, ke Mucha fariĝis famekonata en la mondo.

La parolado okazis en kadro de ciklo de klubo por malnova Praha, de urba biblioteko en Prago – de distrikta biblioteko en Praha 5 kaj de Biblioteko de Nacia Muzeo "Paroloj, diskutoj pri Praha, kiel ĝia 303." daŭrigo, la 12.6.2002 en prelegsalono de Nacia Muzeo – Václavské placo en Praha 1.

Registris, transskribis kaj lingve aranĝis HELGA TURKOVA

Traduko: Jací

— nova reeldono de la proverbaro franca-esperanta —

Multaj lingo-ŝatantoj havigis al si tiun libreton tuj post ĝia apero, sub la plumo de Lucien BOURGOIS. Krom la 900 disvenditaj ekzempleroj, ankaŭ sekvis en 1987 memeldono grandformata de la verkinto (120) ekzempleroj.

Famaĝis jam de longtempe la nemalhavebla « proverbaro » de Zamenhof, kiu ankaŭ estis plurfoje reeldonita. Sed temis fakte pri unulingva verko. La « proverbaro » de L. Bourgeois alportis al la scivolemaj franclingvaj legantoj, kompiladon ne nur de klasikaj diraĵoj sed ankaŭ de modernaj asertoj, tre lerte tradukitaj en esperanto.

Ni menciuj la hodiaŭan pluson, kiu povas esti kunligita al la tradicia dulingva libreto, t.e. proverboj por la anglalingvaj « klientoj » ...

La 250 ekzempleroj de la nova eldono verŝajne rapide elcerpiĝos...

Mendon oni direktu al

CERCLE AMICAL ESPERANTISTE, FR-47470 BEAUVILLE

Poŝtkonto BOR 3371 74 M

(menciuj same sur la banko-ĉeko)

Prezo por unu ekzemplero, 3,5 €. Por la koncerna suplemento, oni aldonu 0,5 €. Oni simple mendu nombron de la dezirataj libroj... kaj oni malkovros la fakturon en la pakajo, ĉar la poŝta tarifo varias laŭ la kvanto.

Konkurso 'La Verda Stelo'

Kiu estas 'La Verda Stelo'?

Internacia Televido alvokas ĉiujn kantistojn kaj ensemblojn (diletantajn aŭ profesiajn) partopreni la unuan televidan konkurson pri E-muziko - 'La Verda Stelo' - kadre de la lanĉota programo *Muzikume*.

La celo de la konkurso estas malkovri la novajn stelojn de la E-muziko, pere de aperta konkurso, kies venkinton elektos la publiko de **Internacia Televido** mem, pere de enketoj. La konkurso estos prezentita laŭlonge de la monatoj januaro kaj februaro, en la programo *Muzikume*.



La konkursa venkinto (kantisto aŭ ensemblo) havos specialan programon kadre de *Muzikume* por prezenti pliajn muzikojn de sia repertuaro, subskribos kontrakton kun la diskeldonejo de brazila entrepreno CIDKON por la lanĉo de KD kaj por la kreado de unu muzikvideo profesie farita de unu el siaj muzikoj, kaj gajnos profesie faritan retejon por promocii sian diskon kaj muzikojn.

Rapide sendu vian aliĝon al la konkurso, ĉar la datfalo por la liverado de la konkursontaj muzikoj estos la **15-a de januaro 2006**. La konkursantoj (unuopaj kantistoj aŭ ensembloj) devos sendi al la administracio de **Internacia Televido** unu muzikon, **nepre kantatan en la internacia lingvo Esperanto**, kune kun aliaj informoj.

Detaloj de la konkurso 'La Verda Stelo' troviĝas en ties regularo. Por legi la regularon de la konkurso, bv. musklaki ĉe *internacia TV...* je la indikita loko malsupre de la specifa informo

Internacia Televido estas unu el la iniciatoj de **Ĝangalo**

... Malica hakero provis forviŝi retejon de Internacia Televido :- (...

Merkrede, la 30-an de novembro la retejo de **Internacia Televido** ĉe la portalo *Ĝangalo* estis atakita de fihakero, kiu forviŝis ĉion en la servilo de **ITV**.

Krom la tuttaga neatingeblo de la televida retejo la atako tamen ne kaŭzis pli grandan damaĝon, danke al antaŭaj problemoj de *Ĝangalo* kun fihakeroj, kiu igis la teamon de ambaŭ iniciatoj havi laborprocedon por rapide reaktivigi la retejon.

"... *Ne estis la unua fojo, ke retejo de la konzerno CIDKON (la entrepreno, kiu administras la portalon 'Ĝangalo' kaj la ret-televido esperantista 'Internacia Televido')* havis problemojn kun fihakeroj. En sia preskaŭ 3-jara historio, oni provis damaĝi al *Ĝangalo* kvar fojojn. La

plej serioza el tiuj atakoj lasis la plej grandan esperantistan portalon for de la reto dum 4 tagoj" ... informis la teamo de *ITV-Ĝangalo* ... *La administracio de Internacia Televido pardonpetas al ĉiuj, kiuj volis spekti la esperantistan televidkanalon en ĉi tiu merkredo. La teknikistoj de la televidkanalo nun jam ĉion reinstalis.* "

Nia Zamenhof en parolado dum la 2-a UK Genevo-1906 profetis: "*Venos iam la tempo, kiam Esperanto... perdos sian karakteron idean; tiam... oni nur tirados el ĝi profiton...* "

Ni aŭguras profitema kaj daŭra la sukceson de "Internacia televido"!


Laŭ mesaĝo de Ro. Sartoro redaktoro, Bonaera *Ĝangalo*-redakcio

ITV LANĈAS ANTAŬVENDON DE DVD-OJ KUN PROPRAJ PROGRAMOJ

Kun la celo kune festi por la unuamonata datreveno de **Internacia Televido**, la administracio de la esperantista televidkanalo antaŭvendos la unuajn du DVD-ojn kun programoj originale faritaj de Internacia Televido. Unu el tiuj DVD-oj estas speciala programo *Televida Epopeo*, kiu priskribas la tri-jaran kampanjon por la establo de esperantista televidkanalo. En *Televida Epopeo*, oni vidos la planon krei televidkanalon en Esperanto, same kiel la problemojn, kiujn alfrontis nia teamo laŭlonge de la kampanjo. Temas pri historia dokumento, kaj ankaŭ memoraĵo pri la plej grava atingo de la esperantistoj ĉe la komenco de ĉi tiu jarcento.



La alia DVD estas *Infanurbo - Videodisko 1*, de la baldaŭ lanĉota porinfana programo de Internacia Televido. Estos la unua DVD por infanoj en la lingvo Esperanto, kun muzikoj, pupoj, kartunoj kaj multe pli. La prezo de ĉiu DVD originale farita de Internacia Televido normale kostos 20 eŭrojn, sed al tiuj, kiuj antaŭmendas ilin, la kosto falos al **15 eŭroj** - 25% je rabato! La sendo-kosto estas 5 eŭroj ene de Brazilo, kaj 10 eŭroj por aliaj landoj. vendo@internacia.tv



Antaŭ kelkaj tagoj aperis nova **DVD** (*Digital Versatile Disc*) kun **Esperantaj voĉoj** de konata sovetia scienc-fikcia filmo "*Kin-Dza-Dza!*"

La 128 minuta, humurplena, profunde filozofia filmo estis farita en 1986, kaj nun enhavas elekteblajn sontrakojn kun Esperanta sinkrona traduko kaj la origina rusa.

Oni povas elekti rigardi la filmon kun opcie ŝalteblaj Esperantaj aŭ rusaj ekran-tekstoj, aŭ entute sen ajna el ili. Tio ebligas uzi la filmon por plej diversaj celoj, kvankam la ĉefa estas lingvopraktikado. La filmon jam prove vidis kelkaj personoj, kaj ili konfirmis, ke por tiu celo **la Esperanta sonigo plene taŭgas**.

La kosto de unu **DVD** estas 12 eŭroj (+ AVI por EU), kaj estas mendebla ĉe la libroservo de UEA:


<http://katalogo.uea.org?inf=6797>

La tradukado, voĉigo kaj prizorgado estas dankebla al *Andrej Grigorjevskij*.

fonto: "*Ret-Info*" <http://www.eventoj.hu>




... pri "Assises Européennes du Plurilinguisme" ...



La 24-an kaj 25-an de novembro okazis en Parizo "*Assises européennes du Plurilinguisme*". Inter la ĉ. 200 partoprenintoj ĉeestis pluraj esperantistoj. *C. Nourmont* aliĝis nome de UEA, aliaj nome de E-D-E (*Eŭropo -Demokratio -Esperanto*), partio, kiu prezentigis ĉe la eŭropaj balotoj en Francio.

Pluraj esperantistoj proponis antaŭe prelegon, kie ili klare menciis Esperanton en sia kontribuo. Ĉiuj rifuzitaj. Sed tiuj du tagoj alportis kelkajn surprizojn. . .



Malferma sesio en la pleno:

En la enkonduka prezento, la kutimaj forviŝoj de artefaritaj lingvoj, sensukcesaj, senkulturaj, ktp, sed ne tre grave, ĉar la prelego estis iom konfuza. . .

Inter la podianoj de la tuj posta sesio sidis *Robert Phillipson* kaj *Charles Durand*.

La surprizo venis de *Charles Durand*. La invitintoj certe atendis (la kontribuo en alia sesio estis pri "*La recherche scientifique paye une taxe à la langue unique*": *scienco pagas imposton pro la unulingveco*) - pri kio li pli malpli intervenis en *NITOBES-simpozio*) de direktoro de *Franca Instituto* pri informatiko en *Hanojo*, ke li glorigos frankofonion. Sed *Charles Durand* tuj anoncis, ke li parolos en sia propra nomo, tute ne en la nomo de sia Instituto. Kaj kio estis la konkluda parto de lia prelego? Ke fronte al tiuj lingvaj problemoj, ktp, ekzistas lingvo facila, kun simpla gramatiko, kiu funkcias jam de jardekoj. . . Mi precizigu la ĉefan aferon: li parolis dum pluraj minutoj pri tiu lingvo, sen nomi ĝin. Li sciis, ke ĝi estas TABŬA vorto (kiel cetere diras *H. Frank*, kiam li preferas uzi *IL*).

La posta preleganto kompreneble tuj prononcis la tabuan vorton, kun kelkaj malestimaj komentoj; sed. . .

Atelieroj:

Mi ĉeestis la atelieron, kie estis prelegontaj *Sean O'Riain*, *R. Phillipson*, *K. Gawlitta*, do subtenantoj de Esperanto. Ankaŭ ĉeestis la esperantistoj de E-D-E (4 aŭ 5); konsiderante, ke estis apenaŭ kvardeko da homoj en la salono, estis forta proporcio da esperantistoj kaj simpatiantoj.

Post prelego de *S. O'Riain*, la kunvenestrino komentis: *...ni ne volis pri Esperanto, kiam ni preparis la kunvenojn, sed en tia formo, kian vi prezentas la aferon, estas tute akceptebla kaj interesa...* (aŭ io tia).

Iuj el E-D-E-anoj intervenis en eble tro pasia maniero (laŭ mia gusto) post la prelego de *Sean*, sed fine ili pravis.

La reagoj ne estis malpli pasiaj flanke de la ne-esperantistoj. Versajne estis la plej vigla debato de la tuta Kunsidaro. Fine estis komento de iuj : ni havas nenion kontraŭ Esperanto, sed kiu rilato kun plurlingvismo? Mankis bedaŭrinde la tempo por pludebati, kaj klarigi tion. Cetere postaj prelegantoj ankaŭ aludis pri Esperanto.


Fina sesio en la pleno:

Ĉe la fina dokumento kaj konkludoj, la raportantino ja menciis la viglan pasian debaton pri Esperanto. . . Ankaŭ la plendojn, ke interne de iuj eŭropaj institucioj, oni ne respektas la egalecon de lingvoj : dunganoncoj estas por "*english native speakers*". Sed plej grave, estis akceptita la propono, el la prelego de *S. O'Riain*, fari eksperimentojn pri la propedeŭtika valoro de esperanto.

Sed ne finiĝis la afero. . . la lasta surprizo : parolis la delegito de *CFTC Jean-Loup Cuisiniez*. Vigle, tre aŭskultite, plej aŭskultite, ĉar li ne parolis en akademia pompa stilo, sed en vera, vereca, vigla stilo, pri la subfosa konkerado de la angla lingvo en Francio. Li parolis ankaŭ pri tiu proceso de la dungitoj de entrepreno *GEMS*, kontraŭ la entrepreno, kies instrukcioj estas en la angla. Ili gajnis, sed la entrepreno apelaciis, kaj estos denove proceso. Kaj, jen la ĉerizo sur la kuko, li menciis, ke la sindikatoj subtenis la dungitojn, kaj ke ili estis helpitaj de la Esperanto-Movado en la manifestacioj... Do entute iom da progreso.

C. Nourmont

el [informado] fonto: "Ret-Info"



... Jen la temo de la **91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco 2006.**

Pri la temo decidis la Estraro de UEA, kiu invitis kiel reĝisoron de ĝia traktado en la UK la ĉilian komitatanon de UEA *Jose Antonio Vergara*. La traktadon de la temo partoprenos la eminenta lingvopolitika fakulo *François Grin*, profesoro pri ekonomiko en la Universitato de



Ĝenevo, kiu festparolos en la kongresa inaŭguro.

- La temreĝisoro s-ro Vergara, jovergaola@surnet.cl, volonte akceptas proponojn pri aliaj kontribuoj kaj ideojn pri la temtraktado.

Ĉiuj estas petataj kunlabori kaj kundiskuti pri la temo jam antaŭ la UK. Por komenca informiĝo UEA rekomendas "*Raporton pri Homara Evoluo*" de la Evolupprogramo de Unuiĝintaj Nacioj, kiu estas trovebla en pluraj lingvoj ĉe:

<http://hdr.undp.org/reports/global/2004/>

Oni komencis ankaŭ esperantigi la raporton. Parto de la traduko jam estas legebla ĉe:

www.tejo.org/uea/traduko_el_HDR_2004

Gazetaraj komunikoj de UEA

Pliaj informoj pri la UK ĉe: www.ukflorenco2006.it aŭ uk2006.informoj@esperanto.it.

Informoj por esperantista gazetaro:

http://www.ukflorenco2006.it/unikodo/lkk_informas/agadoj_lkk/informado_eo/in_formitale/

LKK de la 91-a UK, ĉe Itala Esperanto-Federacio,
Via Villorosi, 38 IT-20143 Milano, Italujo,

Fotoj pri la urbo Firenze estas facile elsuteblaj ĉe

http://www.comune.fi.it/servizi_publici/turismo/firenzeimmagini.htm

Bonvolu mencii la fonton: "*Assessorato al Turismo di Firenze*"

... Intervjuo ĉe UEA-sidejo ...

Post la pasintsemajna elsendo en la *Nederlanda Televido*, hieraŭ, la 2-an de novembro estis pluraj minutoj pri Esperanto en *Radio 747*. Tiu kanalo havas ĉiusemajnan programeron, en kiu redaktorino *Mieke van der Linden* vizitas, sen antaŭa anonco, vendejojn "...kiujn ordinara nederlandano ne (ofte) vizitas..." por aĉeti ion por tiuj "*kiuj jam havas ĉion*".

Ĉi-marde ŝi sonorigis ĉe la pordo de la **Centra Oficejo de UEA** por viziti la libroservon. Nia emerito-volontulo *Rob Moerbeek* akompanis ŝin dum la aĉetado kaj povis multon rakonti pri Esperanto. La redaktorino aĉetis "*Tinĉjo en Tibeto*" kaj la diskon "*Masko*" de Kajto, el kiu unu kanto estis disaŭdigita en la programero.

Osmo Buller

el [landa agado]



Internacia sendependa magazino "*La Ondo de Esperanto*", eldonata en Kaliningrado (Rusio), ekde marto 2004 ĝis julio 2005 enhavis specialan kvarpaĝan aldonon kun la titolo "*Eŭropa Bulteno*". Per tio reviviĝis la "Eŭropa Bulteno", kiu ĉesis aperi en 2002 post la ekŝiĝo de Umberto Broccatelli kiel prezidanto de *Eŭropa Esperanto-Unio*.

Entute aperis 15 numeroj, kiujn redaktis *Dafydd ap Fergus*, *Marko Naoki Lins* kaj *Vesna Obradović*.

Ekde aŭtuno 2005 "*Eŭropa Bulteno*" estos eldonata **nur elektronike**.

Ĉiuj aperintaj numeroj estas legeblaj en la retpaĝaro de "*La Ondo de Esperanto*" ĉe:

<http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-eb.htm>

Laŭ inf. de *Halina Gorecka & Aleksander Korzhenkov* sezonoj@gazinter.net



El nia libro servo

Informoj



⇒ La libro servo partoprenos la 59an regionan staĝon de esperanto en Villers-lès-Nancy la 21-22-23ajn de aprilo 2006 Se vi volas certe trovi deziratan libron tie, mendu ĝin antaŭe al la adreso poŝta aŭ reta de la libro servo (libro servo 37 rue Pierre et Marie Curie FR 54500 VANDŒUVRE libro servo.efe@wanadoo.fr)

⇒ Eble la libro servo partoprenos renikonton en Ulm dum venonta marto



Nove alvenintaj libroj

1)



2)



3)



1) **Por dulingveco en Eŭropo**, Pri esperanto, 112 p, **Selten / Frank, Jfb Verlag 16,50 €**. Argumentado pri uzado de esperanto kiel dua lingvo en Eŭropo

2) **L'Espéranto un nouveau latin pour l'Eglise et l'humanité**, 288 p, **Matthias Flandra esperanto Ligo, 12,00 €**. Franclingva traduko de la libro de Ulrich Matthias...

3) **La Zamenhof strato**, dialogoj, 290 p, **Roman Dobrzynski Varpas Kaunas, 18,00 €**. Nova eldono iom modifita de la interesoplena dialogo inter R. Dobrzynski kaj la nepo de Ludoviko Zamenhof pri lia vivo kaj diversaj aliaj temoj.

Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon

- per poŝte (la plej sekure) al : Libro servo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDŒUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
- per e-poŝto al «libro servo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libro servo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libro servo» sendita al la adreso de la libro servo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la

MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn:

al jena adreso:

-
-
-
-

S-ro/ino

-
-
-

En

la

Subskribo:

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2006 ĝis 2008

La numero 132 de La Informilo, kiun vi nun ricevis, estas la lasta de la abon-periodo 2005. Alvenis la momento renovigi vian jar-abonon por 2006. Bonvolu trovi ĉi-poste la novajn tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Se sur via adres-etikedo estas jam menciita 2006, tio signifas, ke via abono por 2006 estas jam pagita. Se ne, vi bonvolu tre baldaŭ pagi vian abonon kaj kotizon laŭ la ĉi-subaj tarifoj. Ni antaŭ-dankas vin pro via akurateco.

Jaroj:	2006	2007	2008
Abono por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abono por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	6,30 eŭroj	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagmanieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2006 por 1025
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de: Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2006, 2007 ktp Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)

... lastminute !...




Li trenas la piedojn por iri al la lernejo, li ŝatas okulumi al la senvestiĝejo de la knabinoj, li ne ŝatas sportumi sed tre amas sian «aveton», kiu enpartoprenis militon... kaj nun, li scipovas paroli en esperanto !

Ekde nun, mendu la freŝbakitan albumon de la aventuroj de Spiru, ĉe nia libroservo !... (prezo ne ankoraŭ definitive fiksita... - ĉirkaŭ 6 € -)





DISTRANĜULO



jarfina konkurso

Inter la solvintoj de la du enigmoj “**stvbrnz**” kaj “**mistera krado**” estos lotitaj tri laùreatoj.

Ĉiu el ili ricevos verkon el nia libro-servo.

Solvoj povos atingi la redaktejon ĝis la 4a de februaro 2006.

Stvbrnz ——— ✪

Sub tiu kodigita teksteto vi malkovros pensigan aserton de *Pierre Augustin Caron de Beaumarchais*, en la teatraĵo „*Le Mariage de Figaro*”. Ĉiuj literoj estas anstataùigitaj per aliaj. Ekzemple, ĉiuj **N** de la normale skribita aserto fariĝis **K** en la enigmo.

ĉ p e k l e j z k j h e ĥ h l o u o a h p e
 e o a o u k , j e k u h p e k h , k n p ĉ e
 h o ŝ o p ĉ e c o j k e k t z ĵ o o ĵ e o
 u s z j ĉ h u

Mistera krado ——— ✪

Transigu la literojn vertikale alfabete ordigitajn, en la suban « virgan kradon ». Temo : la unua vorto tradukas la manieron plenumi aùtoritecon en Ŝtato aù en societo, kiel faras ekzemple la deputitoj...

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
L	A	A	A	D	E	A	A	E	E
N	A	E	I	I	I	B	K	I	E
O	E	L	I	O	L	K	L	P	R
P	F	N	S	T	N	L	O	R	U
P	O	O	S	T	O	N	P	S	
S	P	R	S	U	O				
	T		S		U				


Solvoj de la lastaj enigmoj (n- 131)

Krucvortenigmo

Katarakto – oligopol – ni – mu – ŝuo –
 Uverturo – nina – pr – io – forlasis – tol – iri
 Inab – ata – al – libiano – ili – ao – sj – ted
 Juk – po – cara

Silab-enigmo

Por glate mensogi oni spriton bezonas



George BUŠ
 kaj la varmigo
 de la terглоbo...
 „*Le Devoir*”
 kebeka ĵurnalo



foto M. A-T



foto A. Gressmann



foto Fr. Poretti

